

AMO 74-1 resuma raporto

## Gravas la kompleta interkomunika sperto

Jen la esenco de la interveno de d-ro Duncan Charters, prezidanto de UEA, al la 74a Seminario pri Aktivula Maturigo, okazigita ene de la Virtuala Kongreso de UEA. Li parolis libere tra 50 minutoj prezentante spertojn kaj memorojn el sia periodo de Eo-lernado kaj uzado. El tio li tiris kelkajn kernajn mesaĝojn. Unue, niaj planoj devas esti pli daŭripovaj. Malsufiĉas instrui nur la lingvon, devas ĉeesti la kultura kunteksto, en kiu ni evoluigu la komunikadajn kapablojn, kio antaŭsupozas la uzon kaj maturigon de interkulturaj spertoj. Gravegas frue en kurso malkovri la interesojn de la kursanoj, kaj pluri laŭ tiuj, ne laŭ strikte formulita plano.



Intervenis la ĝenerala sekretario de UEA, Aleks Kadar (Francio), kun bone formulita listo de bezonoj por sukcesaj Eŭropaj projektoj, Ileana Schroeder (Danlando), kiu kuraĝigis al pliaj landoj starigi petojn por projektoj, cele al financado de la Eŭropaj instancoj, Fernando Maia Jr. (Brazilo), vic-prezidanto de UEA, kun novaj informoj pri la kunlaboro inter UEA kaj la alloga evento SES en Slovakio kaj Anna Löwenstein pri la bezono por pli konvenaj formoj de unua kontakto kun la komunumo por kursfinintoj, ekzemple la retejo <facila.org>.

La partoprenantaro iomete variis, sed atingis pinton de 46 personoj: el Argentino, Benino, Brazilo, Britio, Ĉinio, Ĉeĥio, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Israelo, Italio, Japanio, Kolombio, Kongo DR, Koreio, Meksiko, Mongolio, Nederlando, Norvegio, Rusio, Serbio, Svislando, Tajvano (Ĉinio), Ukrainio kaj Usono. Sume, el 27 landoj. Dekkvino da homoj diskutis aŭ salutis.

Post prezento de la enkonduko, vaste dissendita, apud la fino de la trihora sesio, la patro de AMO, Stefan MacGill, prezentis novan proponon por ligi kursfinintojn iel al la komunumo. Tion en la 21a de julio traktis la Eŭropa Komisiono ene de VK2 sub la gvido de Renato Corsetti, kiu plusekve aktivis ankaŭ en AMO 74. Pro la seminario la programo ricevis kelkajn novajn ideojn, al kiuj la komisiono revenos fine de la kongresa periodo. Pliaj seminarioj revenos al la temaro.